



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Alois Topič (1852–1927), la ĝardenisto, kiu ĉasis ornitorinĥojn

Prelegos: Oldřich Arnošt Fischer



Alois Topič estis ĝardenisto, sukcesa entreprenanto, vojaĝanto kaj patrioto, kiu en la jaroj 1876 – 1902 laboris en Aŭstralio. En la jaro 1888 li donacis al nuntempa Nacia Muzeo en Prago preparitajn kanguruojn kaj pliriĉigis ĝiajn kolektojn per pliaj eksponaĵoj de aŭstralia faŭno. Li detale eksciis vivon de aŭstraliaj aborigenoj, tondistoj de ŝafa lano kaj orfosistoj. Li estis la unua homo en la mondo, kiu observis kaj priskribis nutradon de ornitorinĥidoj per lakto, tial li estas citata en faka internacia zoologia literaturo.

(La bildeton desegnis Oldřich Arnošt Fischer)

Lingvo: Esperanto (montrataj aplikaĵoj estos en la ĉeĥa)

Kiam: la 10-an de novembro 2020 je la 18-a h.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per programo Skype (Skajpo). Se vi ankoraŭ na havas ĝin, mi petas vin instali ĝin. Oni povas elŝuti la programon el retejo <https://www.skype.com/cs/get-skype/>. Vi povas uzi ĝin per komputilo, tabletkomputilo kaj saĝpoŝtelefono (Android kaj iPhone). La sistemo funkcias ankaŭ per retumilo (Edge kaj Chrome), sed ni rekomendas uzi programon.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofono en via portebila komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ esperantistoj el fremdaj landoj. Ni vidos.



Nia programo en novembro:

la 17-an

ŝtata festo, renkontiĝo ne okazos

la 24-an

Kiel ni travivis novembron 1989. Mi petas vin ĉiujn, ke vi preparu rakonton, kiel vi travivis Veluran revolucion 1989.



Ĝis la 15-an de novembro mi akceptas antaŭmendojn de libro [Manlibro pri instruado de Esperanto](#) kaj Poŝamiko.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<http://www.esperantobrna.cz/malnova/program.htm>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Milan Kolka
vicprezidanto